

Joseph Freiherr von Eichendorff,  
Nachts

Ich wandre durch die stille Nacht,  
Da schleicht der Mond so heimlich sacht  
Oft aus der dunklen Wolkenhülle,  
Und hin und her im Tal  
Erwacht die Nachtigall,  
Dann wieder alles grau und stille.

O wunderbarer Nachttgesang:  
Von fern im Land der Ströme Gang,  
Leis Schauern in den dunklen Bäumen -  
Wirrst die Gedanken mir  
Mein irres Singen hier  
Ist wie ein Rufen nur aus Träumen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26).*

*Arg-1069-2157 (2014-06-27 19:56:38)*

Joseph Freiherr von Eichendorff,  
Nokte

*tradukita de Cezar*

Mi migras tra la noktkviet',  
Ŝteliras ofte en sekret'  
jen Lun' el nigra nubkovrilo.  
Kaj tie, ĉie en la val'  
Vekiĝas najtingal',  
Kaj poste reas griz', trankvilo.

Ho vi mirinda noktkantad':  
El for' tra l' land' riverplaŭdad'.  
Sub nigraj arboj eĉ trem-plonĝo  
Konfuzas pensojn ĝi.  
Freneze kantas mi,  
Jen kvazaŭ voko nur el sonĝo.

*Traduko de la Germana poemo "Nachts" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de CEZAR (civila nomo: Hans-Georg Kaiser, \*1954-05-21).*

*Arg-1069-2158 (2014-06-27 22:00:11)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://cezartradukoj.blogspot.de/202/12/josefo-de-eichendorff-kristnasko.html#/2013/06/josefo-de-eichendorff-nokte-rimpoemo.html>.*